There are two reasonable ways in which this conflict can be resolved. One is to treat the norm of equality as absolute and sacrifice the savings that could be obtained from relegating the smallest languages to unofficial status. Under this approach, one would adopt a language regime in class A, H, or I. The other way is to moderate the norm of equal language treatment into a norm of equal speaker treatment, making only the largest languages official and instituting transfer payments from their speakers to the speakers of other languages to compensate them for their differential learning costs. Under this approach, one would adopt a language regime in class B, C, D, E, F, or G.

When asked whether or not the equal treatment of languages should be redefined or sacrificed for the sake of cost reduction, EU elites typically respond "no". When allowed to make this exchange in daily life, they often act in ways that imply „yes“. This conflict between words and deeds may reflect a recognition of the crucial role this normative choice plays in determining the optimal language regime for the EU.

If the norm of equal language treatment is ratified and entrenched, we can expect to see a language regime with features suggested by classes A, H, and I. In these language regimes, all groups' languages have the same status. In class A, no group language is official; all representatives learn language 0, the synthetic language, and use it as their exclusive medium of deliberation, without any translation. In class H, all groups' languages are official, no representative needs to learn another language, and every speech is translated first into language 0 and then from language 0 into every other official language except the one in which it was given. In class I, all groups' languages are official, no representative needs to learn another language, and every speech is translated directly from its original language into every other official language.

If the norm of equal language treatment is redefined or sacrificed for cost minimization, we can expect to see a language regime with features suggested by classes B, C, D, E, F, and G. In all these classes, at least one of the groups' languages is official, but at least one is unofficial. Representatives of groups whose languages are unofficial must learn and use one of the official languages. The administration translates every speech into all the official languages other than its original language. The six classes in this group differ in three ways: (1) how many of the groups' languages are made official, (2) consequently whether any translation takes place, (3) whether language 0 is one of the languages that the speakers of unofficial languages may learn (in C, D, and E, it is; in B, F, and G, it is not), and (4) whether translation (if any) is performed directly (as in C and F), indirectly via the largest language (as in E and G), or indirectly via language 0 (as in D).

Were a decision made to let cost minimization dictate the solution, it would be reasonable to expect the administration to estimate the cost determinants and describe the policy alternatives with increased care. Data would replace the simplifying assumptions used here about the deliberation, the translation market, etc. The relative costs of variants of the 36 language regimes in classes B, C, D, E, F, and G would be estimated.

If, however, the equal treatment of languages and the minimization of cost are recognized as competing values, neither dominating the other, we can expect a more complex result. Then the particular conditions of the various EU agencies would tend to tip the scales in favor of language regimes in the A/H/I family or the B/C/D/E/F/G family. The European Parliament might adopt an A/H/I solution, most likely H or I so as to let newly elected members participate without any language learning and to preserve a record of the deliberation in each constituency's domestic official language. An agency that collects water-pollution data for use of a Commission directorate might adopt a B/C/D/E/F/G solution, most likely B, so as to avoid the cost and delay of translation when the cost of any language learning the staff requires to become competent in a shared language is rela-

tively low. Even within an agency, language regimes could optimally vary among departments, offices, or even conversations (cf. Colomer [forthcoming]).

Although this analysis provides no basis for a prescription of the optimal EU language regime, it does give reasons for considering 40 different language regimes potentially optimal for an institution that recognizes nine languages. How many such alternatives the EU evaluates will be one measure of how seriously it seeks to optimize its language regime.

References

Ammon, U. (1991): "Die Stellung der deutschen Sprache in Europa und in der Welt im Verhältnis zu ihrer Stellung in den EG-Gremien". Sociolinguistica, 5, 70-84

Barrera i V.A. (1991):"Le catalan, une langue d'Europen. Sociolinguistica, 5, S. 99-110

Born, J. (1992): "Eurospeak + Eurotexte = Eurolinguistik?" Sprachreport, 1992: 2-3, 1-3

Colomer, J. M. (forthcoming): "To Translate or to Learn Languages?" International Journal of the Sociology of Language

Cooper, R. L. (1989): Language Planning and Social Change. Cambridge, U.K.: Cambridge University Press

Coulmas, F. (1991a): "Die Sprachenregelung in den Organen der EG als Teil einer europäischen Sprachenpolitik". Sociolinguistica, 5, 24-36

Coulmas, F. (1991b): "European Integration and the Idea of the National Language: Ideological Roots and Economic Consequences". In Coulmas (1991c), pp. 1-43

Coulmas, F. (ed.) (1991c): A Language Policy for the European Community. Berlin: Mouton de Gruyter

Cwik, M., H. Erasmus, E. Kehlet, G. Maertens, G. Giovanni, E. Symoens (1991): "Komunikado en la Europa Komunumo". Manuscript

Danzin, A. (1992): Vers une infrastructure linguistique europeenne. Rapport pour La Commission des Communautés Européennes (DG XIII), 31.03,

Das Gupta, J. (1970): Language Conflict and National Development. Berkeley: University of California Press

De Witte, B. (1991): "The impact of European Community Rules on Linguistic Policies of the Member States". In Coulmas (1991c), pp. 163-177

Fettes, M. (1991): Europe's Babylon: Towards a Single European Language? History of European Ideas, 13, 201-213

Frank, H., H. Behrmann (1977): "Overcoming the Language Barriers within Europe by Language Guidance Teaching and by Optimization of the Choice of a Language of Communication". In Commission of the European Communities (ed.), Third European Congress on Information Systems and Networks: Overcoming the Language Barrier (München: Dokumentation), pp. 1: 39-62

Gehnen, M. (1991): "Die Arbeitssprachen in der Kommission der Europäischen Gemeinschaften under besonderer Berücksichtigung des Französischen". Sociolinguistica, 5, 51-63

Grin, F. (1993): "European Economic Integration and the Fate of Lesser Used Languages". Language Problems and Language Planning, 17, 101-116

Haarmann, H. (1974): Sprachpolitische Organisationsfragen der Europäischen Gemeinschaft. Hamburg: Stiftung Europa-Kolleg

Haarmann, H. (1991): "Monolingualism versus Selective Multilingualism - On the Future Alternatives for Europe as it Integrates in the 1990s". Sociolinguistica, 5, 7-23

Haberland, H. (1992): Personal communication, 24 July

Haberland, H., C. Henriksen (199): "Dänisch - eine kleine Sprache in der EG". Sociolinguistica, 5, 85-98

Haselhuber, J. (1991):"Erste Ergebnisse einer empirischen Untersuchung zur Sprachensituation in der EG-Kommission (Februar 1990)". Sociolinguistica, 5, 37-50

King, C. E. (1977): The Implications of Additional Languages in the United Nations System. New York: United Nations. A/32/237

Koch, H. (1991): "Legal Aspects of a Language Policy for the European Communities: Language Risks, Equal Opportunities, and Legislating a Language". In Coulmas (1991c), pp. 147-161

Laitin, D. D. (1977): Politics, Language, and Thought: The Somali Experience. Chicago: University of Chicago Press

Le Monde (1990): "Les Verts votent pour l'esperanto". 15 February

O'Barr, W. M., J.F. O'Barr (eds) (1976):. Language and Politics. The Hague: Mouton

Pavlidou, T. (1991): "Linguistic Nationalism and European Unity: The Case of Greece".In Coulmas (1991c), pp. 279-289

Pool, J. (1991a): "The Official Language Problem". American Political Science Review, 85, 495-514

Pool, J. (1991b): "The World Language Problem". Rationality and Society, 3, 78-105

Reuter Library Report (1992): "EU's Gift of Tongues Threatens Nuclear Brain Drain Plan". Brussels, 8 May

Roche, Nick (1991):. "Multilingualism in European Comrnunity Meetings--A Pragmatic Approach". In Coulmas (1991c), pp. 139-146

Süddeutsche Zeitung (1992). "Brüssel steht mit der deutschen Sprache auf Kriegsfuß". 11 February

The Independent (1992). "EU in Legal Mess". Brussels, 28 February

Van Hoof-Haferkamp, R. (1991). "L'interprétation de conférence à la Communauté europé enne". Sociolinguistica, 5, 64-69

Weinstein, B. (1983). The Civic Tongue: Political Consequences of Language Choices. New York: Longman

Received 1995-02-03

Author's address: Jonathan Pool, Esperantic Studies Foundation, 6100 Southcenter Boulevard, Suite 150, Seattle, Washington 98188-5708, U.S.A.

Optimuma lingva reĝimo por la Eŭropa Unio (Resumo)

Samkiel aliaj lingve diversaj institucioj, la Eŭropa Unio konfliktas dum la elekto de oficialaj lingvoj. Kreskanta aktiveco dum akceptado de novaj ŝtatoj minacas per lingvopolitika krizo. Unu eblo solvi ĝin estas pli zorgema analizo de ĝenerale eblaj lingvoreĝimoj por la institucioj similaj al EU kaj pravigo de ilies optimigo. Lingva reĝimo klarigeblas kiel aroj de oficialaj lingvoj kaj leĝoj ebligantaj kompletan reciprokan komprenon en interkonsiliĝo inter reprezentantoj de lingvogrupoj. Se nur la grupaj lingvoj kaj unu sinteza lingvo estas relevantaj, se la reprezentantoj estas unulingvaj, la tradukistoj dulingvaj kaj aliaj simpligoj faritaj, ekzistas preskaŭ kvinoblo da eblaj optimumaj lingvaj reĝimoj ol da lingvogrupoj . La lingvoreĝimoj divideblas en dek klasojn laŭ oficialaj lingvoj kaj tradukmanieroj.

La daŭro kaj urĝeco de interkonsiliĝo , kapacito de tradukhelpiloj, graveco de lingva samrajteco, disdivido de grupgrandecoj kaj relativaj kostoj de lernado de la sinteza lingvo estas kelkaj kondiĉoj direktantaj la optimuman lingvoreĝimon. La plej regantaj kondiĉoj en la EU kreas klaran elekton inter du familioj de lingvoreĝimoj. Unu familio kontentigas la proklamitan normon de samrajta lingvoagado, oficialigante aŭ neniun, aŭ ĉiujn lingvojn. La alia familio, oficialiganta nur la plej grandajn lingvojn, sistemigas la normalan EU-praktikon oferi lingvan samrajtecon al la kostoredukto. La venko de unu normiga pozicio favorigus la koncernan lingvoreĝimon, sed la daŭra normiga batalo tendencus al produktado de kompleksa variigo en la lingvaj reĝimoj tra la EU-agentejoj.

grkg / Humankybernetik
Band 39 · Heft 1 (1998)
Akademia Libroservo / IfK

Zur Algebra der natürlichen Transformationen in der Semiotisch-Relationalen Grammatik

von Alfred TOTH, Hamburg (D)

aus dem Mathematischen Seminar der Universität Hamburg


Die algebraische Kategorie der (semiotischen) Zeichen ist das (algebraische) Zeichen der semiotischen Kategorien (mit deren Produkten als Trichotomien).

Max Bense (1981: 149)

1. *Einführung*


Die Semiotisch-Relationale Grammatik (Toth 1997a, 1997b) formalisiert im Gegensatz zu den bekannten Modellen der mathematischen Linguistik nicht die sprachlichen Einheiten und Ebenen, sondern die sie repräsentierenden Zeichen und Zeichenstrukturen. Als Basis dient dabei die von M. Bense und R. Marty begründete kategorietheoretische Konzeption der Semiotik (Leopold 1990). Das abstrakte SRG-Modell wird konstruiert, indem man auf der Abszisse und der Ordinate eines rechtwinkligen Kartesischen Koordinatensystems jeweils die neun Trichotomischen Triaden (Walther 1981, 1982) so aufträgt, daß die thetische Einführung der triadischen Zeichenrelation durch den Interpretanten gewährleistet ist und indem man die gleichen thematisierten Realitäten durch Linien verbindet. Dadurch entsteht das folgende Netzwerk mit 66 Schnittpunkten:

(1)




Wie in Toth (1997a) ausführlich dargestellt, sind alle 66 Punkte in Form von Tripeln von Morphismen darstellbar und hängen sowohl in vertikaler, als auch in horizontaler Richtung durch mindestens einen und maximal zwei Morphismen miteinander zusammen, wobei für multiple Morphismen ein Adjazenzgesetz gilt (Toth 1997a: 77). Bei Tripeln mit multiplen Morphismen hat zudem durchwegs einer der beiden Morphismen einen längeren Geltungsbereich. Entsprechend kann zwischen Haupt- und Nebenpfaden durch das SRG-Netzwerk unterschieden werden. Wir beschränken uns zunächst auf die Hauptpfade. Die vertikalen natürlichen Transformationen sind:

(2)




Die horizontalen natürlichen Transformationen sind:

(3)



Netzwerk (2) gibt von oben nach unten die Enkodierungsprozesse, von unten nach oben die Dekodierungsprozesse für alle grammatischen Einheiten auf allen grammatischen Ebenen wieder (Toth 1997a: 127f). Netzwerk (3) zeichnet von rechts nach links die Synthese, von links nach rechts die Analyse aller grammatischen Einheiten auf allen grammatischen Ebenen nach:

(4)



2. *Korrespondierende Morphismen der Hauptpfade*

Wie sich nun zeigen läßt, besteht eine interessante Korrespondenz zwischen Enkodierung und Dekodierung einerseits und Synthese und Analyse andererseits. Bevor wir die korrespondierenden Morphismen in den Netzwerken (2) und (3) ermitteln, stellen wir die korrespondierenden Pfade zusammen (die Nummern bezeichnen die Schnittpunkte in (1)). Als Symbol für die Korrespondenz verwenden wir "↔".

(5)

(1-9)	↔	(66-9)
(10-17)	↔	(62-8)
(18-24)	↔	(55-7)
(25-33)	↔	(65-6)
(34-41)	↔	(60-5)
(42-48)	↔	(52-4)
(49-57)	↔	(64-3)
(58-63)	↔	(58-2)
(64-66)	↔	(49-1)

Werden die Pfade in Form von natürlichen Transformationen notiert (vgl. (2) und (3)), erhält man:

(6)

(1-9) ↔ (66-9)			(10-17) ↔ (62-8)			(18-24) ↔ (55-7)		
id_3	↔	id_1						
id_3	↔	id_1	id_3	↔	id_1			
id_3	↔	id_1	id_3	↔	id_1	id_3	↔	id_1
β	↔	α	β	↔	α	β	↔	α
β	↔	α	β	↔	α	β	↔	α
$\beta\alpha$	↔	$\beta\alpha$	α	↔	β	id_1	↔	id_3
$\beta\alpha$	↔	$\beta\alpha$	α	↔	β	id_1	↔	id_3
$\beta\alpha$	↔	$\beta\alpha$	α	↔	β	id_1	↔	id_3

(25-33) ↔ (65-6)			(34-41) ↔ (60-5)			(42-48) ↔ (52-4)		
id_3	↔	id_1						
id_3	↔	id_1	β°	↔	α°			
id_3	↔	id_1	β°	↔	α°	β°	↔	α°
id_2	↔	id_2	id_2	↔	id_2	id_2	↔	id_2
id_2	↔	id_2	id_2	↔	id_2	id_2	↔	id_2
α	↔	β	α	↔	β	id_1	↔	id_3
α	↔	β	α	↔	β	id_1	↔	id_3
α	↔	β	α	↔	β	id_1	↔	id_3


(49-57) ↔ (64-3)			(58-63) ↔ (58-2)			(64-66) ↔ (49-1)
id_3	↔	id_1				
id_3	↔	id_1	$\beta°$	↔	$\alpha°$	
id_3	↔	id_1				
$\alpha°$	↔	$\beta°$				
$\alpha°$	↔	$\beta°$	$\alpha°$	↔	$\beta°$	-
id_1	↔	id_3				
id_1	↔	id_3				
id_1	↔	id_3	id_1	↔	id_3	

Die korrespondierenden Morphismen sind somit:

(7)
$\alpha \leftrightarrow \beta$
$\alpha° \leftrightarrow \beta°$
$\beta\alpha \leftrightarrow \beta\alpha$
$\alpha°\beta° \leftrightarrow \alpha°\beta°$ (erschlossen)
$id_1 \leftrightarrow id_3$
$id_2 \leftrightarrow id_2$

Mit sich selbst korrespondieren also die (konstanten) Morphismen $\beta\alpha$, $\alpha°\beta°$ und id_2. Die Verhältnisse lassen sich in einer kategorietheoretischen Matrix folgendermaßen darstellen:

(8)



(8) setzt also folgende Abbildung voraus:

(9)

S° \ S	1	2	3
1	id_1	α	$\beta\alpha$
2	$\alpha°$	id_2	β
3	$\alpha°\beta°$	$\beta°$	id_3

⇒

S° \ S	1	2	3
1	id_3	β	$\beta\alpha$
2	$\beta°$	id_2	α
3	$\alpha°\beta°$	$\alpha°$	id_1

Da diese Abbildung, wie man leicht nachprüft, nur im dreidimensionalen Raum, nicht aber in der Ebene möglich ist, liegt hierin ein Hinweis auf die Existenz eines Zeichenraumes, wie er seit längerer Zeit immer wieder, aber zumeist nur intuitiv, postuliert wurde (vgl. Stiebing 1978, Arin 1981, Steffen 1981).

3. *Korrespondierende Morphismen der Haupt- und Nebenpfade*

Daß die Einbeziehung der Nebenpfade in die Überlegungen zur Algebra der natürlichen Transformationen unentbehrlich ist, soll im folgenden exemplarisch anhand der Korrespondenzen zwischen den morphismischen Übergängen bei der Enkodierung des Diskurses und dem Aufbau der grammatischen Einheiten auf der untersten taktischen Ebene, d.h. anhand von

(10) (1-9) ↔ (66-9)

aufgezeigt werden:

(11)
$[id_3, id_3, id_3] \leftrightarrow [id_1, id_1, id_1] \leftarrow [id_1, id_1, id_1]$
| | | | | |
$[id_3, id_3, \beta] \leftrightarrow [id_1, id_1, \alpha] \leftarrow [\alpha, id_1, id_1]$
| | | | | |
$[id_3, id_3, \beta\alpha] \leftrightarrow [id_1, id_1, \beta\alpha] \leftarrow [\beta\alpha, id_1, id_1]$
| | |
$[id_3, \beta, \beta] \leftrightarrow [id_1, \alpha, \alpha] \leftarrow [\alpha, \alpha, id_1]$
| | | | | |

$$
\begin{array}{ccccccccccc}
[\beta, & \beta, & \beta] & \leftrightarrow & [\alpha, & \alpha, & \alpha] & \leftarrow & [\alpha, & \alpha, & \alpha] \\
| & | & & & | & | & & & & | & | \\
[\beta, & \beta, & \beta\alpha] & \leftrightarrow & [\alpha, & \alpha, & \beta\alpha] & \leftarrow & [\beta\alpha, & \alpha, & \alpha] \\
& | & & & & | & & & | & & \\
[id_3, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftrightarrow & [id_1, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftarrow & [\beta\alpha, & \beta\alpha, & id_1] \\
& | & | & & & | & | & & | & | & \\
[\beta, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftrightarrow & [\alpha, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftarrow & [\beta\alpha, & \beta\alpha, & \alpha] \\
& | & | & & & | & | & & | & | & \\
[\beta\alpha, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftrightarrow & [\beta\alpha, & \beta\alpha, & \beta\alpha] & \leftarrow & [\beta\alpha, & \beta\alpha, & \beta\alpha]
\end{array}
$$

Bei der Darstellung der natürlichen Transformationen ausschließlich mit Hauptpfaden konnte der Eindruck entstehen, man brauche, um die Raumdrehung der Morphismen im Sinne von (9) zu vollziehen, sie bloß nach dem Schemata der Korrespondenzen in (7) zu substituieren. Die Einbeziehung der Nebenpfade und somit die Berücksichtigung der Positionen der natürlichen Transformationen belehrt uns jedoch, daß, um das korrekte Resultat zu erzielen, zusätzlich eine Invertierung (Dualisierung; hier durch "←" gekennzeichnet) erforderlich ist. So korrespondiert also in (11) mit der linken Kolonne nicht die rechte, sondern die mittlere.

Die durch die natürlichen Transformationen ausgedrückten Abbildungsbeziehungen in der SRG sind somit in horizontaler und vertikaler Richtung wechselseitig ineinander überführbar. Linguistisch betrachtet, bedeutet das, daß in SRG Enkodierung und Dekodierung einerseits und Synthese und Analyse andererseits in einem semiotisch-kategorietheoretisch eindeutigen Abbildungsverhältnis stehen.

Dieser linguistisch erstaunliche Sachverhalt läßt sich abschließend allgemein in Form eines Algorithmus wie folgt notieren:

(12)
1. Nimm einen vollständigen (horizontalen oder vertikalen) Pfad (mit Haupt- und Nebenpfaden).
2. Substituiere die Morphismen gemäß (7).
3. Dualisiere die so erhaltenen natürlichen Transformationen wie in (11).
4. Das Ergebnis ist ein vollständiger (vertikaler oder horizontaler) Pfad mit Haupt- und Nebenpfaden).

4. *Schrifttum*

Arin, E.: *Objekt- und Raumzeichen in der Architektur*. Diss. ing. Univ. Stuttgart, 1981
Bense, M.:*Axiomatik und Semiotik*. Baden-Baden: Agis, 1981
Leopold, C.: *Kategorietheoretische Konzeption der Semiotik*. In: Semiosis 57/58, S. 93-100, 1990
Steffen, W.: *Zum semiotischen Aufbau ästhetischer Zustände von Bildwerken*. Diss. phil. Univ. Stuttgart, 1981
Stiebing, H.M.: *Zusammenfassungs- und Klassifikationsschemata von Wissenschaften und Theorien auf semiotischer und fundamentalkategorialer Basis*. Diss. phil. Univ. Stuttgart, 1978
Toth, A.: *Entwurf einer Semiotisch-Relationalen Grammatik*. Tübingen: Stauffenburg, 1997a

Toth, A.: *Auf dem Weg zur ersten semiotischen Grammatik*. In: Bayer, Udo, Karl Gfesser und Juliane Hansen (Hrsg.), *Signum um Signum. Elisabeth Walther-Bense zu Ehren*. Baden-Baden: Agis, S. 298-310, 1997b
Walther, E.: *Vorläufige Bemerkungen zu Trichotomischen Triaden*. In: Semiosis 21, S. 29-39, 1981
Walther, E.: *Nachtrag zu "Trichotomischen Triaden"*. In: Semiosis 27, S. 15-20, 1982

Eingegangen 1998-01-08

Anschrift des Verfassers: Dr. Alfred Toth, Plattenstr. 66, CH-8032 Zürich

Towards algebra of natural transformations in the semiotical relational grammar (Summary)

Semiotical Relational Grammar (SRG), as developed by the author, is based on a two-dimensional semiotical network whose paths can be determined with aid of categorial algebra. The present study shows that the natural transformations expressing the mappings in the network can be mutually substituted progressing from top to bottom and from the right to the left, respectively. The linguistic interpretation of this peculiarity is that it exists a strict correspondence between encoding and decoding of grammatical information on the one side, and between synthesis and analysis on the other side. This correspondence can be formulated algorithmically.

Al algebro de naturaj transformoj en la semiotike-rilatiga gramatiko (Resumo)

Semiotika relacia gramatiko (SRG), tiel, kiel evoluigis ĝin la aŭtoro, baziĝas sur dudimensia semiotika retaro, kies pado povas esti determinita helpe de kategoria algebro. La prezentata artikolo motras, ke la naturaj transformoj, esprimantaj la bildigon en la retaro, povas esti reciproke anstatŭigitaj, procedante de supre malsupren kaj de dekstre maldekstren laŭkoncerne. La lingvistika interpretado de tiu ĉi specialaĵo estas, ke ekzistas strikta interrilato inter enkodigo kaj dekodigo de gramatika informo unuflanke, kaj inter sintezo kaj analizo aliflanke. Tiu ĉi interrrilato povas esti formuligita algoritme.

Sur l'algèbre des transformations naturelles dans la grammaire sémiotique-relationelle (Résumé)

La grammaire relationelle sémiotique (SRG), en tant que l' auteur l' a développée, est établie dans un circuit sémiotique bidimensionel, dont la ligne peut être determinée à l' aide de l' algèbre logique. L' article présenté montre, que des transformations naturelles, esprimantes la projection dans un circuit, peuvent être substituées mutuellement, tout en procédant de haut en bas et de droit à gauche. Une interprétation linguistique de cette spécialité se montre dans une éxistence d' une correspondance entre codification et décodification de l' information grammaticale d' une part et entre la synthèse et l' analyse d' autre part. On peut formuler cette correspondance d' une manière algorithmique.

grkg / Humankybernetik
Band 39 · Heft 1 (1998)
Akademia Libroservo / IfK

Lingvo-Orientiga Instruado (LOI) cele al rapidigo de la lernado de fremdlingvoj. Sloven-kroat-aŭstra eksperimento 1993-1995

de Zlatko TIŜLJAR (SLO)

A) Enkonduke

La kibernetik-pedagodian teorion pri LOI ellaboris dum lastaj tridek jaroj ĉefe prof. Dro Helmar Frank el kibernetika instituto en Paderborn, kiu ankaŭ organizis la unuan grandan eksperimeton de LOI laŭ la t.n. Paderborna modelo.

La baza demando el kiu eliras la teorio rilatas al la malnova konstato, ke kono de iu lingvo rapidigas la lernadon de alia, ĉefe se la lingvoj estas parencaj kaj certagrade similaj. Sed ne estas egala la rezulto en la kazo, se oni unue lernas lingvon L1 kaj poste L2 kiel en la kazo, se unue oni lernas L2 kaj poste L1. Iuj lingvoj estas pli bonaj kiel enkonduklingvoj kaj pli rapidigas la lernadon de aliaj lingvoj.

La pravigo lerni iun lingvon unue kaj poste la efektive deziratan povas ekzisti nur se la tempo de lernado de la enkonduklingvo L1 + la tempo de lernado de la celata lingvo L2 estas malpli granda ol la nura tempo de lernado de L2, sen antaŭa lernado de L1, do se:

$$t(L1\ L2) < t(L2) \leq t(L2\ L1).$$

B) Raporto pri la internacia eksperimento laŭ la Paderborna modelo aranĝita en Slovenio, Kroatio kaj Aŭstrio inter 1993-1995

1. *Celoj*

La eksperimenton planis kaj ellaboris la projekton Inter-kulturo en Maribor, gvidata de Zlatko Tiŝljar. Subtenis la projekton Pedagogia fakultato en Maribor kaj prezentis ĝin al la Ministerio por Sciencoj de Respubliko Slovenio por financado en 1993.

La komenca tezo, kiun la eksperimento volis pruvi, estis, ke la lernantoj kiuj unue lernas 70 lernhorojn Esperanton, poste tiom pli rapide kaj sukcese lernos la anglan aŭ germanan, ke la efekto estos pli granda ol la investitaj komencaj 70 horoj por lerni Esperanton. Por pruvi, ke la tezo validas en diversaj landoj, necesis la eksperimenton efektivigi en almenaŭ tri landoj.

Minimumo de anoncitaj infanoj en unuopa grupo estis 10, kiuj lernos Esperanton kaj estis necese tuj elekti saman nombron da infanoj por kompara grupo kun la proksimume

samaj rezultoj el gepatra lingvo (kaj fremdlingvo en tiuj lernejoj kie la eksperimento komenciĝis en 5-a aŭ 6-a klaso, ĉar ili jam antaŭe lernis iom da fremdlingvo).

2. *Partoprenantoj*

Kiam fine de 1993 la Ministerio por Scienco de Respubliko Slovenio akceptis financi la projekton, estis elektitaj 4 lernejoj por la eksperimento:

a) Hauptschule II en Deutschlandsberg (Aŭstrio), duaj klasoj (sesa jaro de lernejo),
b) Elementa lernejo Preĵihov Voranc en Maribor (Slovenio), kvinaj klasoj,
c) Elementa lernejo Alojzije Stepinac en Zagreb (Kroatio) - 2 grupoj (la unua en kvaraj klasoj kaj la dua en kvinaj)
d) Elementa lernejo en Radlje ob Dravi (Slovenio) - kvaraj klasoj.

3. *Efektivigo de la eksperimento*

En ĉi tiu resumo de la projekto ni ne ripetos la tutan sciencan klarigon de kibernetik-pedagogia teorio pri apliko de teorio de informacio por mezuri kaj kalkuli la eksperimentrezultojn. Mi nur diru, ke por plibonigi la lernkurbon (ricevi pli bonajn rezultojn en la sama tempo) ni devas influi al la kvanto da lernenda informacio, ĉar la lernrapideco dependas de individuo kaj aĝo, sekve estas neinfluebla kaj la efikanco dependas de eksteraj kaj organizaj faktoroj. La kompreno de la informacio pliboniĝas per influo de la kaŝita transfero, kiun ni ricevas per antaŭa instruado de simpla kaj dispartebla modelo. Tiun kaŝitan transferon ni povas kalkuli per jena formulo:

$$K = \frac{\ln(1 - p_1{}^*) - \ln(1 - p_o{}^*)}{\ln(1 - p_1{}^x) - \ln(1 - p_o{}^x)}$$

p_1 estas kompetenco post certa lernado,
p_0 estas komenca kompetenco
indekso *signas modellingvon antaŭlernatan
indekso ^{x} signas celatan lingvon.

a) 8 gelernantoj de la dua klaso (sesa lernojaro) de Hauptschule II en Deutschlandsberg (Aŭstrio) lernis Esperanton en 1993-a jaro (unuajn 30 instruhorojn gvidis Zlatko Tiŝljar kaj la postajn 40 instruistino de tiu lernejo: H. Gross). En la jaroj 1994 kaj 1995 la gelernantoj estis testitaj pri la angla lingvo la 25-an de okt. 1994, la 20-an de marto 1995 kaj la 26-an de junio 1995. En la samaj tagoj la testojn de la angla faris paralela kompara grupo de la samaĝaj 8 gelernantoj, kiuj ne lernis antaŭe Esperanton.

b) Du grupoj en Zagreb (Kroatio) kaj unu en Maribor (Slovenio) lernis Esperanton en la dua duono de la lernojaro 1993/94, de februaro ĝis junio 1994. Ambaŭ grupojn en

Zagreb gvidis instruistino Vera Roknić, instruinte 70 horojn. La grupon en Maribor instruis Zlatko Tiŝljar.

La Zagrebaj grupoj komencis 20-ope kaj la finon atingis po 10 gelernantoj en ĉiu el la grupoj.

c) La grupo en Maribor estis en tiu periodo instruita dum nur 40 instruhoroj, kion finis 6 gelernantoj. Estis planite daŭrigi en septembro, sed tiam la gelernantoj ne volis plu daŭrigi. Tial necesis fari postajn testojn kun ili, malgraŭ tio ke Esperanton ili ne lernis sufiĉe longe. Al la testoj unu el la lernantinoj entute neniam venis, sekve nur 5 gelernantoj estis testitaj pri la anglaj scioj. En la finaj kalkuloj ni tamen tiun grupon eliminis el la eksperimento.

La testoj pri la angla lingvo estis faritaj jene:

- por la 4-aj klasanoj de Zagreb (10 en la Esperanta grupo kaj 10 en la kompara ne-Esperanta grupo) la 10-an de februaro 1995, la 19-an de majo 1995 kaj la 17-an de novembro 1995.
- por la 5-aj klasanoj de Zagreb (10 en la Esperanta grupo kaj 10 en kompara ne-Esperanta grupo) la 14-an de junio 1994, la 10-an de marto 1995 kaj la 19-an de junio 1995,
- por la 5-aj klasanoj de Maribor (5 en la Esperanta grupo kaj 4 en la ne-Esperanta kompara grupo) la 21-an de junio 1994, la 23-an de marto 1995 kaj la 20-an de junio 1995).

d) La grupo de 4-aj klasoj de la elementa lernejo en Radlje ob Dravi lernis Esperanton 70 horojn de oktobro 1994 ĝis marto 1995, la lernadon finis 7 gelernantoj. La instruisto estis Zlatko Tiŝljar, kaj ĉiujn instruhorojn sekvis instruistino de la lernejo Sonja Vinŝek.

Testoj de la germana lingvo kun tiu grupo estis faritaj kune kun la same granda grupo de tiuj, kiuj ne lernis Esperanton, la 1-an de februaro 1995, la 10-an de majo 1995 kaj la 8-an de novembro 1995.

Tiel estis entute efektivigitaj po tri testoj de la angla por entute 33 E-lernintoj de Esperanto kaj 32 nelernintoj de Esperanto. Krome estis efektivigitaj 3 testoj de la germana lingvo por 7 gelernantoj kiuj lernis Esperanton kaj por 7 kiuj ne lernis ĝin, do entute por 40 gelernantoj kiuj lernis E-on kaj 39 kiuj ne lernis ĝin.

Ĉiuj testoj konsistis el 15 testfrazoj kaj por ĉiu testo estis faritaj egale malfacilaj 2 versioj de la testo (A kaj B) por ke estu malpli granda ŝanco por la gelernantoj transskribadi unuj de la aliaj. Ĉiu el la 15 testfrazoj havis unu lokon malplenan kaj kvar eblajn respondojn. Necesis elekti unu el la 4 respondoj per kiuj necesis kompletigi la mankantan lokon. Tiel estis eble ricevi maksimume 15 punktojn por ĉiu lernanto krom en 3 testoj de la angla (en unu estis eblaj maksimume 17 punktoj kaj en aliaj du po 19 punktoj).

Entute estis do ellaboritaj 24 demandaroj kun 360 testofrazoj kaj 1440 eblaj respondoj.

Per la supre prezentitala formulo ni kalkulis la faktoron K de la kaŝita transfero. Por ricevi la efektivan procentaĵon, laŭ kiu la Esperanta grupo lernas pli sukcese la anglan respektive la germanan ol la ne-Esperanta (se K estas pli granda ol 1) necesas apliki la jenan formulon:

$$p = (1 - 1/K)100.$$

Se temas pri relative malgranda K, la procentaĵo preskaŭ samegalas kun la decimalaj punktoj post 1, ekz. Se K = 1,13 la procentaĵo P = 12-13%. Sed ju pli granda estas K, la diferencoj estas ĉiam pli grandaj.

Pro tio, ke neniu grupo lernis Esperanton antaŭ la lernado de la alia fremdlingvo, kio estus ideala por la paderborna modelo, ni decidis kalkuli la kaŝitan transferon inter teoria nula punkto (ekz. tempo antaŭ la lernado de la angla kaj Esperanto, kiam laŭsupoze ambaŭ grupoj sciis neniom da angla, do iliaj nescioj estis egale grandaj Uo = Uo* = 1) kaj la postaj testoj. Do, ni nomas tiujn kaŝitajn transferojn: K01 (inter teoria nula punkto kaj unua testo), K02 (inter nula punkto kaj dua testo) kaj K03 (inter nula punkto kaj la tria testo).

Por kontrola celo ni kalkulis ankaŭ kaŝitan transferon inter unua kaj tria testo kiun ni nomis K13.

4. *Rezultoj de la 4 testoj*

I-a grupo (4-a klaso, germana lingvo, Radlje ob Dravi, Slovenio)

1. Testo:	**Nombro:**	**Ĝustaj respondoj De la tuta grupo**	**Meze po lernanto**	**K (kaŝita transfero)**	**P (procento de pliboneco de E)**
a) Esperanto lernantoj:	7	70 el 105 eblaj	10	K01 = 1,56	36%
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	7	53 el 105 eblaj	7,57		

2. Testo:	**Nombro:**	**Ĝustaj respondoj De la tuta grupo**	**Meze po lernanto**	**K (kaŝita transfero)**	**P (procento de pliboneco de E)**
a) Esperanto-lernantoj:	6	44 el 90 eblaj	7,33	K02=2,397	58,3%
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	6	22 el 90 eblaj	3,66		

3. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	6	50 el 90 eblaj	8,33	K03=1,646	39,2 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	6	35 el 90 eblaj	5,83		

K13 = 1,375 P13 = 27,3%

Averaĝa procentaĵo de pliboneco de E-lernantoj el ĉiuj 4 rezultoj estas **40,2%.**

II-a grupo (4-a klaso, angla lingvo, Zagreb, Kroatio)

1. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto-lernantoj:	16	172 el 240 eblaj	10,75	K01=1,194	16,3 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	16	168 el 240 eblaj	10,5		

2. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	13	169 el 195 eblaj	13,0	K02=1,038	3,7 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	14	177 el 210 eblaj	12,64		

3. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	10	137 el 150 eblaj	13,7	K03=1,456	31,3 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	9	110 el 135 eblaj	12,2		

K13 = 2,256 P13 = 55,7 %.

Averaĝa procentaĵo de la pliboneco de Esperanto-lernantoj estas **26,75%.**

III-a grupo: (5-a klaso, angla lingvo, Zagreb, Kroatio)

1. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	10	133 el 150 eblaj	13,3	K01=1,00	0 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	10	133 el150 eblaj	13,3		

2. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo lernanto	Meze po transfero)	K (kaŝita	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	10	132 el 150 eblaj	13,2	K02=0,921	- 8,5 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	10	135 el 150 eblaj	13,5		

3. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	10	136 el 150 eblaj	13,6	K03=1,118	10,5 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	10	132 el 150 eblaj	13,2		

K13 = 1,422 P13 = 29,6 %.

Averaĝa procentaĵo de la pliboneco de Esperanto-lernantoj estas **7,9%.**

IV. Grupo (6-a klaso, angla lingvo, Deutschlandsberg, Aŭstrio)

1. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	8	102 el 120 eblaj	12,75	K01=1,24	19,3 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	8	94 el 120 eblaj	11,75		

2. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	6	97 el 114 eblaj	16,17	K02=1,05	4,8 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	6	95 el 114 eblaj	15,90		

3. Testo:	Nombro:	Ĝustaj respondoj De la tuta grupo	Meze po lernanto	K (kaŝita transfero)	P (procento de pliboneco de E)
a) Esperanto lernantoj:	7	120 el 133 eblaj	17,14	K03=1,227	18,5 %
b) NeEspe-ranto-lernan-toj:	7	113 el 133 eblaj	16,14		

K13 = 1,173 P13= 14,7%.

Averaĝa procentaĵo de la pliboneco de Esperanto-lernantoj estas **14,32%.**

5. *Interpreto de la rezultoj*

La dua grupo estis eliminita pro kelkaj malĝustaĵoj. Ĉe ĉiuj aliaj grupoj estas evidente videbla pozitiva rezulto, nome ĉie, krom en unu kazo la kaŝita transfero K estas pli granda ol nulo. La plej interesaj estas la kaŝitaj transferoj K03 (inter la tempo antaŭ la fremdlingva lernado kaj la tria testo) kaj K13 (inter la unua kaj la tria testo), ĉar ili montras la rezultojn atingitajn en la plej granda tempa distanco. Tiu kaŝita transfero por ĉiuj 4 grupoj estas kiel sekvas:

K03 = 1,646< 1,456< 1,118 kaj 1,227 aŭ **averaĝe K03 = 1,3725** kaj sekve la procentaĵo de pliboneco ĉe la esperanto-grupoj estas **P03 = 27,15%.**

K13 = 1,375< 2,256< 1,422 kaj 1,173. **Averaĝe K13 = 1,556. P13 = 35,7%.**

Se ni forigas ekstremajn rezultojn (la plej malbonan kaj la plej bonan) por ankoraŭ pli malgrandigi la ŝancon, ke eventuala hazardo ludu rolon en la rezultoj, la averaĝa K03 = 1,3415, P03 = 25,5% kaj K13 = 1,398, P13 = 28,5%. Do, ankaŭ en tiu kazo la rezultoj estas praktike tre similaj kun la supre konstatitaj. *Eblas konkludi, ke efektive tiuj, kiuj lernis 70 horojn la internacian lingvon, plirapidiĝas poste en la lernado de la angla, respektive la germana je proksimume* ***25-30%,*** kio signifas ke post 2 jaroj da lernado de la fremda lingvo ili scias 50-60 % pli bone ol tiuj kiuj ne lernis Esperanton. Ĉar la fremdan lingvon oni lernas 3 horojn semajne, do 120 horojn jare aŭ 240 horojn dum 2

jaroj, la ŝparo estas pli ol 120 horoj. Sekve la investitaj 70 horoj de la internacia lingvo kompensiĝas jam post malpli ol 2 jaroj de la fremdlingva lernado.

Literaturo

Brandovská, V. (red.): *Kybernetische Pädagogik/Klerigkibernetiko*. AL/IfK-Verlag, Paderborn. Vol. 6, 1993; Vol. 10, 1997

Formaggio, E.: *Lerneja eksperimento pri lernfacileco kaj transfero en la fremdlingvoinstruado*, Grkg/Humankybernetik, Band 30, Kajero 4 (1989), p.141-151.

Frank, H.: *Kibernetike-pedagogia teorio de la Lingvo-Orientiga Instruado*. En: Barandovská, 1993, pj 311-331

Frank, H.: *Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo, Kybernetische. En: Barandovská, 1993,* pj 424-442, Paderborn 1993

Frank, H. kaj E. Formaggio: *La profito el propedeŭtika* (speciale lingvo-orientiga instruado depende de aĝo kaj transfero, Grkg/Humankybernetik, Band 33, Kajero 4 (1992), p. 164-174

Frank, I.: *Raporto pri instruado de Esperanto en elementa lernejo en Oberndorf am Neckar* (1994/95). En: Barandovská, 1997, pj 895-896

Fukuda, Y.: *Zur rationalisierten Fremdsprach-Lehrplanung unter Beruecksichtigung der (z.B. deutschen oder japanischen) Muttersprache.* Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft 21, p.1-16, 1980

Geisler, E.: *La unuaj mezuradoj pri la lernplifaciligo inter la Internacia kaj la Angla lingvoj*, Eŭropa Dokumentaro 21/1979, p. 9-10

Geisler, E.: *Mezurado de la lernplifaciligo de la angla pro ILo*, Eŭropa Dokumentaro, Nro 25/1980, p 4

Szerdahely I.: *La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj*, En Internacia Pedagogia revuo, kajero 0, 1979

Sonnabend, H.: *Esperanto: lerneja eksperimento*. Raporto, analizo, konkludo, Edistudio, Pisa 1979

Tišljar, Z.: *Raporto pri la 14-taga eksperimento pri rapida Esperanto-lernado en Deutschlandsberg kaj Radlje,* en: „Esperanto vivos malgraŭ la esperantistoj" Inter-kulturo, Maribor 1997

Recevita: 1998-01-18

Adreso de la aŭtoro: Zlatko Tišljar, Besednjakova 1, SLO-2000 Maribor

Sprachorientierungsunterricht zur Beschleunigung des Fremdsprachenlernens (Knapptext)

Interkulturo in Maribor organisierte unter der Kontrolle der Pädagogischen Fakultät in Maribor (SLO), und unter Leitung von Zlatko Tišljar ein Experiment nach dem Paderborner Modell des Sprachorientierungsunterrichts.
Zu prüfen war, ob das Lernen einer Modellsprache E (nämlich der Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto) während der Zeit $t(E)$ die übliche Lernzeit $t(F)$ für eine Fremdsprache F (hier: Englisch oder Deutsch) so stark – nämlich auf $t(F|E)$ - verkürzt, daß $t(E)$ überkompensiert wird:

$$t(E) + t(F|E) < t(F).$$

In 5 Klassen in Slowenien (2), Kroatien (2) und Österreich (1) wurde während 80 Stunden in den Jahren 1993 und 1994 unterrichtet. Dabei wurden die Englischkenntnisse in 4 Versuchsklassen und die Deutschkenntnisse in 1 Versuchsklasse sowie in gleichgroßen Kontrollgruppen (ohne E) getestet. Das letzte Kapitel macht aufgrund der Erfahrungen Vorschläge für die Organisation eines neuen, wissenschaftlich aussagekräftigeren Experiments.

Machbare Mehrsprachigkeit in Europa und der wissenschaftlichen Welt

Vorwegnahmen und verbleibende Fragen einer Sektion der internationalen Tagung „Kommunikationskybernetik am Jahrtausendende".

Farebla plurlingveco en Eŭropo kaj en la scienca mondo

Supozoj kaj problemoj solvendaj en sekcio de internacia konferenco pri „Komunikadkibernetiko je la jarmilfino".

von Helmar FRANK und Vera BARANDOVSKÁ, Paderborn (D)

1. *Beschreibbare Mehrsprachigkeit*

Der vollständige Titel dieser dritten Sektion unserer kommunikationskybernetischen Tagung im Rahmen der internationalen Woche der Begegnung über „*Koexistenz - Kommunikation - Kooperation in Europa und der wissenschaftlichen Welt*" lautet: „*Machbare Mehrsprachigkeit für den Ausbau Europas und die internationale wissenschaftliche Kommunikation*". Der Hauptbegriff in diesem Sektionsthema lautet also: *Mehrsprachigkeit.*

Mehrsprachigkeit *besteht* tatsächlich in Europa, und man könnte diesen Bestand wissenschaftlich untersuchen, wie es z. B. Gyula Décsy mit seinem Werk „Die linguistische Struktur Europas" vor 25 Jahren tat.

Mehrsprachigkeit besteht *auch* (*inzwischen* - und vorläufig *noch*) in der *heutigen* wissenschaftlichen Welt. Zuvor war mindestens die *abendländische* Wissenschaft vorübergehend einsprachig, nämlich lateinisch. Einige Zweige der Wissenschaft sind inzwischen schon wieder einsprachig geworden, nämlich englisch. Man könnte diese Entwicklung kulturwissenschaftlich untersuchen, um mit futurologischen Methoden zu Prognosen über die Weiterentwicklung zu kommen. Auch dazu gibt es Literatur, z.B. die Arbeit von Sabine Skudlik über die Entwicklung der Sprachenvielfalt im wissenschaftlichen Schrifttum Deutschlands.

2. *Wünschenswerte Machbarkeiten*

Beide mögliche Thematiken - die literaturwissenschaftssprachliche wie die eurolinguistische - würden aber am vorentschiedenen Thema unserer Sektion vorbeigehen. In beiden Fällen würde nämlich das entscheidende, einschränkende Adjektiv „*machbar*" vor „*Mehrsprachigkeit*" übersehen. Es geht uns hier nicht darum, uns auf den Mond zu schießen, um als externe Beobachter Zustand und Entwicklung der mehrsprachigen Kommunikation auf dieser Erde zu beobachten. Wir alle nehmen an der Kommunikation teil, in Europa oder in der wissenschaftlichen Welt, oder in beidem - und die meisten von uns kommunizieren mehrsprachig. Es geht uns hier noch weniger darum, uns zu Fatalisten zu machen, die wissen wollen, wie es wei-

1. *Priskribebla plurlingveco.*

La kompleta titolo de ĉi tiu tria sekcio de nia komunikadkibernetika konferenco kadre de la internacia semajno renkontiga pri „Kunekzistado - komunikado - kunlaborado en Eŭropo kaj la scienca mondo" tekstas: „Farebla plurlingveco por la kompletigo de Eŭropo kaj por la internacia scienca komunikado". La ĉefnocio en ĉi tiu sekcia temo do estas: *plurlingveco.*

Plurlingveco *fakte ekzistas* en Eŭropo, kaj tiu stato estas eĉ science esplorebla, kiel montris ekz. Gyula Décsy antaŭ 25 jaroj per sia verko „Lingvistika strukturo de Eŭropo".

Plurlingveco ekzistas *ankaŭ (intertempe* kaj portempe *ankoraŭ)* en la *hodiaŭa* scienca mondo. Iam estis almenaŭ la *okcidenteŭropa* scienco dum certa tempo unulingva, nome latina. Kelkaj sciencaj branĉoj iĝis intertempe denove unulingvaj, nome anglaj. Tiun evoluon eblas kulturscience esplori, uzante futurologiajn metodojn por akiri prognozojn pri la pluevoluo. Ankaŭ tiatipa literaturo jam ekzistas, ekz. la disertaĵo de Sabine Skudlik pri evoluo de lingva multeco en la scienca literaturo de Germanio.

2. *Dezirindaj farebloj*

Ambaŭ eblaj temaroj - la literaturlingvoscienca samkiel la eŭrolingvistika - preterirus la antaŭdeciditan temon de nia sekcio. En ambaŭ kazoj oni ja ne rimarkus la decidantan, limigan adjektivon *„farebla"* antaŭ *„plurlingveco".* Nun ne temas pri tio, ke ni lanĉigu nin al la luno por rigardi el la pozicio de ekstera observanto la staton kaj evoluon de la plurlingva komunikado sur tiu ĉi tero. Ni ĉiuj partoprenas en la komunikado, ĉu en Eŭropo, ĉu en la scienca mondo, ĉu en ambaŭ - kaj la plejmulto de ni komunikadas plurlingve. Des malpli temas pri tio, ke ni iĝu fatalistoj, dezirantaj informiĝi pri estontaj

tergeht, um sich in das unvermeidliche Schicksal fügen. Vielmehr gilt es, selbstverantwortlich unser „Wirksal" wenigstens mitzugestalten, zu *bewerkstelligen.*

Wenn aber etwas bewerkstelligt, also schlicht gesagt: „gemacht" werden soll, dann müssen zwei Fragen gleichrangig behandelt werden, nämlich

a) die *normative, wertende* Frage: Was ist wünschenswert und von uns gewollt? - und

b) die *wissenschaftlich feststellende* Frage: Was ist (vom von uns Gewollten - oder im Gegensatz zu diesem) heute *wirklich*, und was ist durch welche Maßnahme künftig *möglich*, also bewerkstelligbar, „machbar"?

3. *Vorweg-Annahmen*

Das Thema unterstellt, daß wir die Vielsprachigkeit *wollen* - in Europa und in der wissenschaftlichen Welt. Sicher gibt es noch (oder wieder) einige, welche die Vielsprachigkeit als Übel ansehen, als babylonische Verwirrung zur Bestrafung sündhafter menschlicher Überheblichkeit. Wer Mehrsprachigkeit so sieht, mag eine Einsprachigkeit als Segen erhoffen oder als Weltverbesserung erstreben. Darüber zu diskutieren ist hier nicht unser Ziel - hoffentlich befindet sich unter uns kein Verfechter einer solchen monokulturellen Ideologie. Wir steigen schon eine Etage höher in die sprachpolitische Diskussion ein, indem wir nicht mehr fragen, *ob* wir Mehrsprachigkeit für wünschenswert halten, sondern nur noch, *welche* Mehrsprachigkeit wir (um welchen Preis und zu welchen allgemeineren Zielen) wollen.

4. *Alternative Ziele und Zielrechtfertigung*

Würde es uns genügen, wenn - der seinerzeitigen Ideologie Ivo Lapennas gemäß - jeder Europäer bzw. jeder Wissenschaftler außer seiner eigenen Sprache (und außer seinem gegebenenfalls in der Familie gesprochenen Dialekt) auch noch eine und dieselbe *neutrale* Sprache spräche, die also, als *einzige* Fremdsprache, von jedem gelernt werden müßte? Wenn ja, soll diese gemeinsame Verständigungssprache *Latein* sein, oder - wie Ivo Lapenna es wollte und die Esperantisten es wollen - die *Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto* - oder eine andere interlinguistische Plansprache? Welche Argumente sollen entscheiden?

Oder wollen wir, daß mehrere heutige *ethnische* Sprachen auch *sprachgrenzübergreifend* angewandt werden, wie gegenwärtig vor allem das Englische - und bisweilen auch noch das Französische, Russische, Deutsche und Spanische? Was würde mit einem sol-

okazaĵoj kaj subiĝi sub la neevitebla sorto. Male: endas memrespondece almenaŭ kunprodukti, real*igi* nian „memkaŭzitan sorton".

Sed, se io estu realigata, do, sobre dirite, „farata", tiam estas samnivele pritraktendaj du demandoj, nome

a) la *normiga, valoriga* demando: Kio estas dezirinda, kaj kion ni volas? - kaj

b) la *science konstatanta* demando: Kio estas (de tio, kion ni volas, aŭ male al ĝi) hodiaŭ *reala*, kaj kio estas, helpe de kiu aranĝo, estonte *ebla*, do realigebla, „farebla"?

3. *Anticipaj supozoj*

La temo supozas, ke ni volas la plurlingvecon - en Eŭropo kaj en la scienca mondo. Certe ekzistas ankoraŭ (aŭ denove) kelkaj, kiuj rigardas plurlingvecon kiel malbonon, kiel babilonan konfuzon por puni pekan homan orgojlon. Kiu tiel vidas la plurlingvecon, tiu povas esperi la unulingvecon kiel benon aŭ strebi al ĝi kiel al plibonigo de la mondo. Pri tio ni nun ĉi tie ne diskutu - espereble ne estas inter ni apogantoj de tia monokultura ideologio. Ni eniras jam unu etaĝon pli supren en la lingvopolitikan diskuton, se ni ne plu demandas, *ĉu* ni opinias la plurlingvecon dezirinda, sed nur ankoraŭ, *kian* plurlingvecon (je kiu prezo kaj pro kiuj pli ĝeneralaj celoj) ni volas.

4. *Celalternativoj kaj celpravigo*

Ĉu sufiĉus al ni, se, konforme al la iama ideologio de Ivo Lapenna, ĉiu eŭropano, respektive ĉiu sciencisto, krom sia propra lingvo (kaj krom sia eventuale familie parolata dialekto) parolus ankoraŭ unu saman *neŭtralan* lingvon, kiun do ĉiu devus lerni kiel la *ununuran* fremdlingvon? Se jes, ĉu tiu komuna interkompreniĝlingvo estu la *latina*, aŭ - kiel volis Ivo Lapenna kaj volas la esperantistoj - *la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto* - aŭ alia interlingvistika planlingvo? Kiuj argumentoj decidigu?

Aŭ ĉu ni volas, ke pluraj hodiaŭaj *etnolingvoj* estu uzataj ankaŭ *lingvolimtranspaŝe*, kiel momente antaŭ ĉio la Angla, kaj ankoraŭ de tempo al tempo ankaŭ la Franca, la Rusa, la Germana kaj la Hispana? Kion oni

chen Verzicht auf eine *neutrale* Verständigungssprache bezweckt? Welche Sprachen sollen durch Nutzung als interethnische Verständigungssprachen privilegiert werden - und warum gerade sie? Soll man dem Europarat folgen, der die Mehrsprachigkeit auf Englisch und Französisch reduziert? Oder soll man, wie UN und UNESCO, noch Arabisch, Chinesisch, Russisch und Spanisch hinzunehmen? Oder wollen wir wenigstens für die wissenschaftliche Welt (oder wenigstens für Europa) das Vorbild der AIS übernehmen, also außer Englisch und Französisch auch noch Deutsch und Italienisch zulassen - andere ethnische Sprachen aber nur regional? Was wären die Argumente für eine solche Entscheidung?

Mindestens *gleichrangig* zur Forderung der Mehrsprachigkeit, wenn nicht sogar ihr *übergeordnet,* sind die Rahmenziele zu beachten, die über unserer gesamten Begegnungswoche stehen: *Koexistenz, Kommunikation* und *Kooperation.* Wenn über Sprachgrenzen hinweg keine *Verständigung* zustandekommt, ist die Koexistenz gefährdet. *Kommunikation* ist also mindestens zur Friedenssicherung notwendig. Kommunikation ermöglicht aber auch Kooperation und damit Synergie, d. h. Steigerung der Wirksamkeit der eigenen Bemühungen durch Zusammenarbeit mit anderen. Wie ist die dazu dienliche Kommunikation mehrsprachig machbar?

5. *Alternative Wege*

Die Frage nach einer geeigneten mehrsprachigen Kommunikationsweise fordert nicht, darüber nachzudenken, was „gut" wäre. Gefragt wird nach dem technologisch „Wahren", also nach dem tatsächlich Machbaren. Nach ihm ist wissenschaftlich zu forschen.

Ist mehrsprachige Kommunikation durch automatische Sprachübersetzung wirksam möglich? Können wir vom elektronischen Taschendolmetscher träumen, ohne nachweislich Nicht-Machbares zu erhoffen, also einem Sprachutopismus zu verfallen?

Ist es möglich, eine schon verbreitete Sprache, beispielsweise das Englische, als gemeinsame Verständigungssprache des mehrsprachig *bleibenden* Europa zu akzeptieren (was Gyula Décsy vor drei Jahrzehnten noch als realisitsch ansah)? Ist also die Argumentationskette wissenschaftlich anfechtbar, die sich im Buch von Werner Bormann und Helmar Frank findet, und die auch Claude Hagège vertritt, nämlich der versuchte Nachweis, daß durch Nutzung des Englischen als gemeinsame Verständigungssprache automatisch

